

PRAĴNA-PARAMITA-SUTROJ¹⁾

aŭ

Sutroj pri la elfaro de l' ekkono

tradukitaj de Seiho NISHI

Antaŭparolo de la tradukinto

Kiel la dua budaisma publikaĵo* mi prezentas al vi du sutrojn, kiuj instruas al ni, kiamaniere oni povas atingi la transan bordon, por vivi en la eterna paco²⁾. La unu estas nomata Praĵna-paramita-ĥridaja-sutro³⁾, en kiu "ĥridaja" signifas koron aŭ centron, ĉar ĝi entenas la esencon de la doktrino. Por la koro-sutro ni posedas du librojn: la malgranda libro diferencas de la granda nur en tio, ke al ĝi mankas mallongaj antaŭparolo kaj postskribo. La alia sutro, multe pli longa ol la koro-sutro, estas nomata Vaĵraĉedika-praĵna-paramita-sutro⁴⁾, en kiu, "vaĵraĉedika" signifas "disrompi ĉion kiel diamanto", ĉar la sutro frakasas ĉion, kio malhelpas la elfaron de l' ekkono. Ambaŭ sutroj estas penetritaj de la ideo de "ŝunjato"⁵⁾, kiu malaprobas ĉion realan malantaŭ la fenomenaj mondo. La diamanto-sutro krome emfazas unikan logikon: kio estas nomata A ne estas A, ĝuste tial ĝi estas nomata A. Per mia traduko mi nur volis konigi la legantojn pri la enhavo de la famaj sutroj, kaj prezentas tial la koro-sutron en plena formo, la diamanto-sutron tamen nur en konciza resumo. Speciale skolastika studo de la budaisma filozofio, precipe pri la ideo de ŝunjato estu allasata al kompetentaj budaologoj, ĉar mi bone scias, ke simpla natursciencisto kiel mi ne taŭgas por tiaj transcendaj temoj. Mi faris mian tradukon ĉefe surbaze de la japanaj kaj ĉinaj tekstoj de N. Nakamura[†] kaj K. Kino (Iwanami-bunko, n-roj 6285/86, 1968) kaj de S. Takubo (Sanki-Bucŝoin, Tokio, 1969), afable donacitaj de D-ro S. Ŝimazaki, al kiu mi ĉi tie esprimas mian tutkoran dankon. En la traduko la sanskritaj vortoj estas esperanto-maniera alfabetumitaj, kaj la japanaj kaj la ĉinaj vortoj japane elparolitaj estas markitaj per asterisko. Mi fine petas la legantojn, ke ili samtempe nepre legu mian tradukon de Sukavativjuho.

* Mi ne povas kompreni, kion signifas ĉi tie "la dua". Seiho Nishi fakte tradukis aliajn budhismajn dokumentojn, kiuj aperis tamen pli poste. Li ankaŭ publikigis "Tiel parolis Konfuceo" antaŭe. Sed kompreneble ĝi ne estas budhisma.

[†] Verŝajne, ne "N. Nakamura" sed "H. Nakamura", nome 中村元.

Praĵna-paramita-ĥridaja-sutro³⁾

Koro-sutro pri la elfaro de l' ekkono
(Plena traduko)

Seiho NISHI

Antaŭ ĉioscia Vekiĝinto⁶⁾ mi riverencas.

Kiam Sankta Bodisatvo⁷⁾ Avalokiteŝvaro⁸⁾ praktikis profundan meditadon por elfari la ekkonon, li konstatis, ke al ĉiuj estaĵoj apartenas 5 elementoj⁹⁾, al kiuj mankas tamen la realeco. (Kaj tiamaniere li povis liberigi sin de ĉia sufero).

Ŝariputro!¹⁰⁾ En tiu ĉi mondo la fenomeno estas nenio alia ol vizio¹¹⁾, kaj la vizio nenio alia ol fenomeno; la fenomeno, tio estas vizio¹²⁾, kaj la vizio, tio estas fenomeno. Same viziaj estas la sento, la percepto, la volo kaj la konscio⁹⁾.

Ŝariputro! En tiu ĉi mondo mankas al ĉia estaĵo la realeco. Nenio estiĝas, nenio perdiĝas; nenio estas kota, nenio pura; nenio pliiĝas, nenio malpliiĝas.

Ŝariputro! El tiu ĉi vidpunkto ne ekzistas la fenomeno, la sento, la percepto, la volo kaj la konscio; ne ekzistas la okulo, la orelo, la nazo, la lango kaj la korpo; ne ekzistas responde la formo, la voĉo, la odoro, la gusto, la aĵoj tuŝeblaj kaj la aĵoj penseblaj. Nenio ekzistas en ĉiuj nomitaj teritorioj, de la okula ĝis la konscia.

Ne ekzistas la alteniĝo, tial ankaŭ la liberiĝo de l' alteniĝo, kaj sekve ne ekzistas ankaŭ la alteniĝo al la maljuniĝo kaj morto¹³⁾, kaj ankaŭ la liberiĝo de ili. Ne ekzistas la sufero, tial ankaŭ ĝia kaŭzo, ĝia subigo kaj ĝia forigo¹⁴⁾. Ne ekzistas io sciinda, io akirinda ¹⁵⁾. Ĉar oni nenion akiras, oni vivas trankvile kun malkovrita koro, konfidante al la ekkono elfarita de bodisatvoj. Ĉar nenio ekzistas, kio kovras la koron, oni eniras sentime kaj senkonfuzo en la eternan pacon²⁾.

Ĉiuj tatagatoj ¹⁶⁾, kiuj vivas tra la tri mondoj: pasinta, nuna kaj venonta, akiris senescepte la absolute ĝustan konvinkiĝon per la elfaro de l' ekkono.

Oni do firme kredu, ke la mantro pri la elfaro de l' ekkono estas potenca mantro, liberiga mantro, suprema mantro, senkompara mantro, kiu forigas ĉian suferon. Ĝi estas vera, ĉar ĝi ne trompas. Jen la mantro pri la elfaro de l' ekkono.

Gate, gate, paragata, parasamgate, bodisvaha!¹⁷⁾

- 1) Praĵna (pannja en palia lingvo = hannja), saĝeco aŭ ekkono; paramita = haramitta*, elfaro.
- 2) Nirvano, nehan*. Stato de perfekta sereneco, atingebla per la klarvidado pri la iluzieco de ĉia memo; stato de absoluta liberiĝo el vivo kaj morto. (Plena vortaro de SAT)
- 3) Hannja-haramitta-ŝingjô*, la ĉina titolo legata japanmaniere. Ŝingjô* = Koro-sutro. Ĉina traduko farita de Genjô (664 p.K.). Estas eĉ mirinde, ke tiu ĉi mallonga sutro konsistanta nur el 276 ĉinaj ideografiaĵoj donis tiel grandan influon sur la japana vivo.
- 4) Kongô-hannja-haramitta-kjô*, la ĉina titolo legata japanmaniere, ankaŭ simple nomata Kongô-hannja-kjô*. Kongo*, (malmola kiel) diamanto.
- 5) Ŝunjato, 空 ku*, signifas origine nulon; io malplena, al kiu mankas realaĵo, kaj en kiu regas nur la kaŭzeco.
- 6) = Budao aŭ Ŝakjamunio.
- 7) Bosacu*, studanto de la budaismo sub la gvido de Budao.
- 8) Kanzeon- aŭ Kanĵizai-bosacu. Simbolo de la mizerikordo, unu el ambaŭ akompanantoj de Amidao.
- 9) 色, 受, 想, 行, 識, 5 elementoj de l'ekzistado. Mi provizore tradukas ilin: fenomeno, sento, percepto, volo kaj konscio, el kiuj la fenomeno apartenas al la objekto observata, kaj 4 ceteraj al la subjekto observanta.
- 10) Ŝarihocu* unu el la 10 grandaj disĉiploj de Budao; naskiĝis en bramana familio, mortis pli frue ol Budao.
- 11) Mi ĉi tie tradukis ŝunjaton⁵⁾ vizio, en la senco, ke al ĝi mankas la realeco.
- 12) 色即是空 Ŝiki-soku-ze-kû*, ŝate uzata frazo por esprimi la efemerecon de la vivo.
- 13) 4 suferoj neeviteblaj en la homa vivo: 生, 老, 病, 死, naskiĝo, malsaniĝo, maljuniĝo, kaj morto.
- 14) 苦, 集, 滅, 道 Ku, jû, mecu, dô*. 4 principoj pri la sufero.
- 15) = la darmo?
- 16) Njorai*, alveninto de la mondo de la absoluta vereco (sinnjo*). En la sutro oni ofte nomas Budaon per tatagato.
- 17) Oni legu: Gjate, gjate, haragjate, harasô-gjate bodi-soŭaka*. La mantro signifas proksimume: 1) Vojo, vojo, transa vojo, ĝusta vojo al la ekkono. Liberiĝo sukcesu! aŭ 2) Irinto, irinto, transirinto, atinginto de la transa bordo, Benon al li!